ISSN 2072-5825

# Espero Katolika




Numero 7-9/2015

Julio-Septembro 2015

**JARKOLEKTO 112 - N. 1128-1130 - Julio/Septembro 2015**
*Finpresita la 05.10.15* — Finito di stampare il 05.10.15

**Sur la kovrilo:** *La turhavaj pontoj de Strasburgo kun, fone, la katolika Katedralo. En la urbo nomata "la koro de Eŭropo" kongresis la kristanaj esperantistoj (v. p. 54).*

## ENHAVO

**FRANCISKO EN EKVADORO, BOLIVIO KAJ PARAGVAJO**
La mesaĝoj de la Papo 43
Lia interparolo kun la ĵurnalistoj 44
**DU PUBLIKAJ PAROLADOJ DE BENEDIKTO LA 16-a**
«La religia muziko kondukas al la vero de Dio» 45
«Kiel oni atingas la higienon de la koro?» 47
**EPISKOPO MARTIRO JE LA HONORO DE LA ALTAROJ**
Flaviano Mikaelo Melki 48
**Nova Patriarko de la armena-katolika Eklezio** 49
**Papo Johano Paŭlo la 1-a baldaŭ beata** 49
**Juĝkortumo verdiktis pri homaj embrioj** 50
**La mirakla Madono de Sinj** 51
**IKUE kaj kristanaj esperantistoj dum la 100-a UK** 52
**LA EKUMENA E-KONGRESO EN STRASBURGO**
Raporto pri la eventoj 54
«Romkatolika akvo»: dumkongresa prelego 55
**MOVADE** 58
**69-a KONGRESO DE IKUE 2016** 59
**FUNEBRE** 60

**Centra Oficejo de IKUE: Via di Porta Fabbrica 15, I-00165 ROMA RM, Italio**
**Elektronika poŝto:** <ikue@ikue.org>
**TTT-paĝoj:** http://www.ikue.org - http://www.esperokatolika.org * **Dissendolisto:** <ikue@yahoogroups.com>
**UEA-konto "ikue-v"** * **Banko:** "Unione internazionale cattolica esperantista" Roma, Italio
IBAN IT34H0760103200000023290000 - BIC/SWIFT: BPPIITRRXXX

*Registriĝo ĉe la tribunalo de Romo* - Registrazione presso il Tribunale di Roma
n. 17138, 11-2-1978

Gratis agli Associati

*Presejo* - Tipografia
ROTASTAMPA s.a.s. - Via G. Mirri 21, 00159 ROMA RM, tel. +39-06.43.80.051

*Respondeca Direktoro* - Direttore responsabile
Antonio DE SALVO, Via Aldebaran 13, Parco Azzurro, I-00010 GUIDONIA RM, Italio
tel. (vespere) +39-07.74.36.36.03 E-poŝto: <antoniodesalvo@tiscali.it>

**Espero Katolika**, revuo fondita en 1903, estas oficiala organo de **I.K.U.E.**
**INTERNACIA KATOLIKA UNUIĜO ESPERANTISTA** internacia asocio de fideluloj fondita en 1910, agnoskita laŭ pontifika juro per Dekreto n. 196/92/S-61/B-25 de 11.2.1992 de la PAPA KONSILIO POR LAIKOJ. **Spirita Konsilanto:** frato Pierluigi Svaldi - **Prezidanto:** Giovanni Daminelli **- Vic-Prezidantino:** Marija Belošević - **Vic-Prezidanto:** Miloslav Šváček - **Ĝenerala Sekretario/Kasisto, direktoro de la C.O.:** Carlo Sarandrea - **Estrarano por ekumenaj rilatoj:** Stefan Lepping. **Kontorevizoroj:** Norma Cescotti Covelli, Tiziana Fossati, Krzysztof Tomczak.

# FRANCISKO EN EKVADORO, BOLIVIO KAJ PARAGVAJO
## (5-an – 13-an de Julio 2015)

Estigis en la tuta mondo komentojn kaj meditojn la fortaj vortoj eldiritaj de la Papo dum la vojaĝo al Latinameriko. Nia artikolo rememorigas kelkajn el la mesaĝoj lanĉitaj de Francisko.



*Mescelebro de Papo Francisko en Ekvadoro*

### Eblas ŝanĝi la sistemon, kiu murdas

Unu el la pli fortaj mesaĝoj, kiuj aperis dum la vojaĝo, estis la papa alvoko al la popoloj de la Tero ŝanĝi “sistemon” regatan de la mono, kiu premegas la homon kaj kiu “ne plu sin tenas”. Necesas “vera ŝanĝiĝo” kaj rapida, ĉar “ŝajnas, ke la tempo ekfiniĝas”. Ŝanĝiĝo, kiu komencu de la malsupro, de la malriĉuloj, de la homoj. La Eklezio subtenas ĉi tiun ŝanĝiĝon, ĉar “Dio aŭskultas la krion de sia popolo”, ĉar “la frata amo ribelas kontraŭ la socia maljustaĵo”. “Nia kredo – diris Papo Francisko – estas revolucia” kaj ne rezignacias nek restas neaktiva fronte al la doloro de la homo. “Pli humana socio eblas”, oni povas realigi “humanan alternativon” al tiu ĉi “ekonomio, kiu murdas” kaj ekskludas. Ĝi ne estas utopio.

### La metodo: dialogo kaj identeco – pontoj, ne muroj

“Ne ekzistas recepto” por ĉi tiu “projekto de frateco kaj justeco”, substrekis la Papo. Sed estas metodo: tiu de la dialogo. “Konstrui pontojn, ne murojn”; dialogo, kiu deiru el forta identeco, “ĉar se mi ekdialogas sen ĉi tiu identeco, la dialogo ne utilas”. Ĝi “estu renkonto, kiu devas kapabli agnoski, ke malsameco ne nur estas bona, ĝi estas necesa. Unuformeco nuligas nin kaj igas nin robotoj. La riĉeco de la vivo kuŝas en la malsameco”. Kaj “dialogi ne signifas intertrakti”, ĉar oni ne intertraktas pri sia propra identeco; dialogi signifas “serĉi la komunan bonon por ĉiuj”, sen timi, ke el dialogo fontos konfliktemo. Necesas akcepti la konflikton kaj “klopodi solvi ĝin” kun “la perspektivo atingi unuecon, kiu ne estas unuformeco, sed unueco en la malsameco”.

### Ideologioj kaj koloniadoj fariĝas diktaturoj

Ĉi-kadre la Papo denove avertis kontraŭ la novaj ekonomiaj kaj ideologiaj koloniadoj, ankaŭ koncerne la familion, kiuj volas unuformigi ĉion kaj trudi siajn regulojn al la pli malfortaj. Francisko denuncis la malnovajn kaj la novajn ideologiojn: “La ideologioj konkludiĝas malbone, ne utilas”. La ideologioj havas rilaton aŭ nekompletan aŭ malsanan aŭ malbonan kun la popolo. La ideologioj ne sin ŝarĝas per la popolo. Samkiel tiuj de la pasinta jarcento, ili ĉiam fariĝas “diktaturoj”. “Ili pensas por la popolo”, sed “ili ne lasas la popolon pensi”.

### La kristanoj partoprenu en la ŝanĝiĝo

Papo Francisko tre invitis la kristanojn partopreni en ĉi tiu ŝanĝiĝo. Ne povas ekzisti kristano indiferenta, kutimiĝinta al maljusteco nur pro la fakto, ke li ne spertas ĝin unuapersone; kristanoj kun koro “fermita”, “blendita”, kiuj kredas aŭskulti Jesuon, sed pasas apud la doloro de la homoj sen halti. La kredo “igas nin proksimaj al aliula vivo. La

kredo estigas nian devontigon por la aliaj". "Kredo, kiu ne fariĝas solidareco, estas malvera kredo". "Ĝi estas kredo sen Dio, sen la gefratoj". "Ĝi ne estas la kredo de Jesuo".

**Ne kasto de malsamuloj, sed personoj tuŝitaj de la mizerikordo**

Plia instigo de la Papo al la kristanoj estis ne izoliĝi "en kasto de malsamuloj", dividitaj de la aliaj, kaj kiuj igas "la identecon motivo de supereco" kaj "ĉiam starigas barilojn por la popolo de Dio": ili malŝatas la aliajn, ĉar "tiuj ne estas kiel ili". Male, kristano estas tiu, kiu "lernis akcepti": la malriĉulon, la malfortulon, tiun, kiu ne pensas kiel li. Kristano ne estas tia, ĉar li estas pli bona ol la aliaj, sed ĉar li estis tuŝita de la "mizerikorda kaj resaniga" amo de Jesuo. Evangelizadi, do ne signifas realigi strategion, sed esti "dankemaj atestantoj pri la mizerikordo, kiu transformas nin" kaj donas la ĝojon al ni.

**La dia kaj homa koro de Jesuo multe amas nin**

Francisko portis kun si al Romo la krucon sur falĉilo kaj martelo, kiun oni donacis al li en Bolivio. Verko simila al tiu, kiun faris pastro Espinal, murdita en 1980 dum la diktatoreco,



ĉar li predikis la Evangelion de la libereco. Evangelio, kiu ĝenas kaj ankoraŭ hodiaŭ kreas "genocidon" de kristanoj. Sed pastro Espinal "estis bonfida en sia batalo" – diris la Papo – "la Kriston mi forportas kun mi": la Kristo, kiu iras trans ĉiu ideologio kaj rigardas la personon, sin ŝarĝas per ĉiuj niaj pekoj por savi la homon. Ĝi estas la mizerikordo de Dio – rimarkis la Papo – ĝi estas "la dia kaj homa koro" de Jesuo, "kiu multe amas nin".

**EN LA AVIADILO FLUGANTA EL ASUNCIONO AL ROMO**

La Papo staris dum unu horo. Ankoraŭfoje li defiis la lacecon kaj sin elmetis al densega vico da demandoj pri la apostola vojaĝo al Ekvadoro, Bolivio kaj Paragvajo, levitaj de kelkaj el la 75 ĵurnalistoj, kiuj sekvis lin. «Kiu estas via "*drogo*"? – li volus demandi…», Francisko ŝerce diris al ĵurnalisto, kiu demandis, kiu estas la "*sekreto*" de lia energio. «Helpas min la "mate" *(la tipa teo de Sudameriko, ndlr)*». Kaj aludante la onidirojn aperintajn antaŭ la vojaĝo koncerne la rimedon, por mildigi la efikojn de la 3600 metroj da alteco en La Paz, li certigis: «Sed mi ne gustumis kokaon. Tio estu klara!».



La lasta demando de la ĵurnalistoj temis pri la mesaĝo, kiun la Papo deziris doni al la latinamerika Eklezio kaj pri la rolo, kiun ĉi-lasta povas havi. Francisko respondis: «La latinamerika Eklezio havas grandan riĉecon: ĝi estas Eklezio juna kaj tio gravas. Ĝi estas Eklezio juna kun ia freŝeco, ankaŭ kun kelkaj neformalaĵoj, ĝi ne estas multe formala. Krome, ĝi havas riĉan teologion de esplorado. Mi volis kuraĝigi tiun junan Eklezion kaj mi opinias, ke ĝi povas doni multon al ni. Jen afero, kiu multe tuŝis min: en ĉiuj tri landoj estis laŭlonge de la stratoj la paĉjoj kaj la panjoj kun la infanoj; ili montris la infanojn. Neniam mi vidis tiom multajn infanojn. Ĝi estas popolo, kaj ankaŭ la Eklezio estas tia, kiu estas leciono por ni, por Eŭropo, kie la malkresko de la naskoj iom timigas kaj kie ankaŭ la politikoj por helpi la multnombrajn familiojn estas malmultaj. Mi pensas al Francio, kiu havas belan politikon por helpi la multnombrajn familiojn kaj ĝi atingis, mi opinias, kreskon 2-procen-

tan, dum aliaj landoj randas nulan kreskon, kvankam ne ĉiuj. Ŝajnas al mi, ke en Albanio ili estas 45-procentoj, sed en Paragvajo pli ol 70-procentoj aĝas malpli ol 40-jarojn. La riĉeco de tiu popolo kaj de tiu Eklezio kuŝas en tio, ke ĝi estas vivanta Eklezio. Ĝi estas riĉaĵo, vivanta Eklezio. Tio gravas. Mi opinias, ke ni devas lerni el tio kaj korekti, ĉar, kontraŭe, se ne venas infanoj… Ĝi estas la temo, kiu multe tuŝas min: la "forapartigo": oni forapartigas la infanojn, la maljunulojn, kaj pro la manko de laboro, la gejunulojn. Pro tio la novaj popoloj, la junaj popoloj donas al ni pli da forto. Por la Eklezio, mi dirus "juna Eklezio" kun la multaj problemoj, ĉar da ili ĝi havas – jen laŭ mi la mesaĝo: ne timi ĉi tiun junecon kaj freŝecon de la Eklezio. Ĝi povas ankaŭ esti Eklezio iom sendisciplina, sed kun la paso de la tempo, ĝi discipliniĝos, kaj ĝi donos al ni multe da bono».

## Benedikto la 16-a faris du publikajn paroladojn

## «LA RELIGIA MUZIKO KONDUKAS AL LA VERO DE DIO»


La granda "religia muziko", kiel volis la 2-a vatikana Koncilio, "ne povas malaperi el la liturgio": ĝia ĉeesto "povas esti tute speciala maniero partopreni en la sankta celebro". Tion deziris la emerita Papo Benedikto la 16-a, kiu la 4-an de Julio ricevis en Kastelgandolfo la honoran doktorecon de la papa Universitato "Johano Paŭlo la 2-a" kaj de la Muzika Akademio de Krakovo, liveritan de la ĉefepiskopo de tiu pola urbo, kardinalo Stanisław Dziwisz.



Amo kaj morto kaj Dio. El la renkonto de la plej grandaj homaj spertoj kun tio, kio estas dia, fontas la plej alta muziko. Alta kiel la granda okcidenta religia muziko – tiu de Mozart, de Bach kaj de aliaj eminentaj majstroj – kiu posedas unikecon de inspiriĝo kaj arto tioman, ke ĝi kondukas ekkapti la "veron" de Dio mem.

**La tri "lokoj" de la muziko**

La konvinkoj de la instruado de Benedikto la 16-a, jam en la historio pro sia nepridiskutebla teologia konsisto, reeĥis klaraj kiel ĉiam, sed kun eĥo des pli laŭtigita de la silento de la lastaj du jaroj, interrompita de tempo al tempo de momentaj publikaj aperoj de la emerita Papo, tamen mankaj je lia parolo. La 4-an de Julio la vortoj de Papo Benedikto konkeris la scenejon por prikanti – ni diru tion – la belecon de la muziko kaj la "tri lokojn" el kiu ĝi, li diris, fontas. La unua estas la "sperto de la amo", kiu malfermas al la



homa estulo “novan grandecon kaj vastecon de la realo”. La dua loko, je la mala flanko, estas “la sperto de la malĝojo, la tuŝo de la morto, de la doloro”. La tria loko “estas la renkonto kun tio, kio estas dia”: “verŝajne – klarigis



Benedikto – eblas aserti, ke en la realo ankaŭ en la aliaj du lokoj – amo kaj morto – la dia mistero tuŝas nin kaj, ĉi-sence, la tuŝo de Dio entute konsistigas la originon de la muziko (…) Oni povas diri, ke la kvalito de la muziko dependas de la pureco kaj de la grandeco de la renkonto kun tio, kio estas dia, kun la sperto de amo kaj doloro. Ju pli tiu sperto estas pura kaj vera, des pli pura kaj granda estos la muziko, kiu el ĝi naskiĝas kaj evoluas”.

**Rilato kun kontrastoj**

Al la delegacioj de la papa Universitato “Johano Paŭlo la 2-a” kaj de la Muzika Akademio de Krakovo Benedikto la 16-a memorigis, ke per la koncilia reformo renoviĝis “la malnovega kontrasto” inter la subtenantoj de la religia muziko en la liturgio kaj la subtenantoj de aktiva partopreno de la fideluloj en la kredocelebroj per ilia pli granda simpleco, ankaŭ muzika. La emerita Papo deiris el sia rememoroj: “Mi mem kreskis en Salcburgio influita de la granda tradicio de tiu urbo. Tie estis nature, ke la festotagaj Mesoj kun akompano de ĥoro kaj orkestro estu kompletiga parto de la kredosperto dum la liturgia celebro. Restas neforviŝebla en mia memoro, kiel ekzemple tuj post la unuaj notoj de la “Kronad-Meso” de Mozart, la ĉielo kvazaŭ malfermiĝis kaj oni spertis tre profunde la ĉeeston de la Sinjoro. Kune kun tio jam ĉeestis ankaŭ la nova realaĵo de la liturgia movado. Kaj iom post iom fariĝis perceptebla la streĉiĝo inter *participatio actuosa* (aktiva partopreno de la fideluloj) konforma al la liturgio kaj la solena muziko, kiu ĉirkaŭis la sanktan faron”.



Laŭ Benedikto la 16-a, ĝuste la liturgio celebrita de sankta Johano Paŭlo la 2-a en ĉiu kontinento, montris “la tutan vastecon de la esprim-eblecoj de la kredo dum la liturgia evento”, kaj samtempe, “ke la granda muziko de la okcidenta tradicio ne estas fremda al la liturgio, sed ke ĝi naskiĝis kaj kreskis el ĝi”. Kaj kun senkompara valoro: “Kadre de la plej diversaj kulturoj kaj religioj – precizigis la emerita Papo – ĉeestas granda literaturo, granda arkitekturo, grandaj pentraĵoj kaj grandaj skulptaĵoj. Kaj ĉie estas ankaŭ la muziko. Kaj tamen en neniu alia kultura kunteksto estas



muziko el grandeco egala al tiu naskita kadre de la kristana kredo: el Palestrina al Bach, al Händel, ĝis Mozart, Beethoven kaj Brückner. La okcidenta muziko estas io unika, kiu ne havas egalon en la aliaj kulturoj. Kaj tio devas pensigi nin”.

**Muziko el teologia rango**

“Ni ne konas la estontecon de nia kulturo nek de la religia muziko”, daŭrigis Benedikto la 16-a, “sed io estas klara: kie vere okazas la renkonto kun la vivanta Dio, kiu en Kristo venas ale al ni, tie naskiĝas kaj denove kreskas ankaŭ la respondo [de la muziko], kies beleco fontas el la vero mem”.

“Tiu muziko, laŭ mi, montras la veron de kristanismo. Kie evoluas tioma respondo, tie okazas la renkonto kun la vero, kun la vera Kreanto de la mondo. Pro tio, la granda religia muziko estas realaĵo el teologia rango kaj kun konstanta signifo por la kredo de la tuta kristanaro, kvankam tute ne necesas, ke ĝi estu ludata ĉiam kaj ĉie. Aliflanke, tamen, estas ankaŭ evidente, ke ĝi ne povas malaperi el la liturgio kaj ke ĝia ĉeesto povas esti tute speciala maniero partopreni en la sankta celebro, en la mistero de la kredo”.

## «KIEL ONI ATINGAS LA HIGIENON DE LA KORO?»

«La vero, la amo kaj la boneco, kiuj fontas el Dio igas la homon pura, kaj la veron, la amon kaj la bonecon oni renkontas en la Parolo, kiu liberigas de la ‘forgesemo’ de mondo, kiu ne plu pensas al Dio». Ĝi estas la kerno de la prediko, kiun la emerita Papo Benedikto la 16-a eldiris matene de dimanĉo la 30an de Aŭgusto dum la Meso de li celebrita ĉe la preĝejo de la Teŭtona Tombejo en Vatikano kaj en kiu partoprenis la membroj de *Schülerkreis* (la rondo de la lernantoj de Ratzinger) kaj de la nova *Schülerkreis*, kiuj faris sian tradician kunvenon en Kastelgandolfo: la ĉi-jara temo estis “kiel paroli hodiaŭ pri Dio”, kun la intervenoj de la ĉeĥa pastro kaj filozofo Tomáš Halík.

En sia prediko en la germana, la emerita Papo parolis pri la teksto el la Evangelio laŭ Marko de la tiutaga liturgio (Mar 7,1-8.14-15.21-23). Benedikto la 16-a komencis siamaniere, ke, kiam antaŭ tri jaroj oni legis tiun saman tekston okaze de la *Schülerkreis*-kunveno, kardinalo Schönborn, kiu predikis, starigis la demandon: «Sed ĉu verŝajne oni ne devas esti purigitaj ankaŭ deekstere kaj ne nur deinterne? Ĉu la malbono venas nur deinterne aŭ ankaŭ deekstere?». Benedikto la 16-a agnoskis, ke li ne memoris la tiaman respondon de la kardinalo, sed ke li trovis la demandon tre interesa. Kaj li fokusigis al ĝi sian predikon: «por doni taŭgan respondon necesas plivastigi la demandon kaj konsideri ne nur ĉi tiun fragmenton de la Evangelio, sed la tutan Evangelion».

Ĉu ne venas al ni ankaŭ deekstere la malbono, kiu agresas nin? Certe, estas necese esti purigitaj de la tuta malpureco, kiu estas ekstere: «ni povus diri, ke ni devas respondi per ekstera higieno al la multaj malsanoj, foje epidemioj, kiuj minacas nin». Estas bone havi tiun specon de respondeco pri la eksteraĵo, por ke la morto ne unuarangu. Kaj tamen tio ne sufiĉas, ĉar ekzistas ankaŭ la “epidemio de la koro”, tiu interna, kiu “kondukas al koruptiĝo kaj al pliaj malpuraĵoj, tiuj, kiuj kondukas la homon pensi nur al si kaj ne al la bono”. Tial, alprenas decidan gravecon, apud la kulto, la *ethos*, tio estas, “la interna higieno”: «kion faras la homo pura? Kiu estas la aŭtentika forto de purigo?



Kiel oni atingas la higienon de la koro?» demandis Benedikto la 16-a, kiu daŭrigis jene: «En alia fragmento de la Evangelio la Sinjoro

diras al la siaj: “Vi estas puraj pro la parolo, kiun mi anoncis al vi”. Oni do fariĝas puraj pere de la Parolo: ĝi estas multe pli ol vortoj, ĉar pere de la vortoj ni renkontas la Parolon, Lin mem. La Parolo estas Jesuo Kristo mem kaj ni renkontas la Parolon ankaŭ en tiuj, kiuj respegulas Lin, kiuj montras al ni la vizaĝon de Dio kaj kiu reflektas lian mildecon, lian korhumilon, lian simplecon, lian amemon, lian sincerecon». «Ke la Sinjoro – finis Benedikto la 16-a – donu al ni ĉi tiun ‘higienon de la koro’, pere de la Vero, kiu fontas el Dio: jen la puriga forto».

Dum la preĝoj de la fideluloj oni preĝis interalie por Papo Francisko “por ke la Sinjoro asistu lin por lia agado, ĉefe por la Jubileo de la mizerikordo”.

Fine de la Meso oni anoncis, ke la 18-an de Novembro estos malfermita en Vatikano la Roma Biblioteko Joseph Ratzinger – Benedikto la 16-a, tute dediĉita al lia vivo kaj penso kiel studulo kaj Papo.

***La siro-katolika episkopo Flaviano Mikaelo Melki, martirigita antaŭ 100 jaroj dum la persekutoj sub la Otomana Imperio, estis beatproklamita la 20-an de Aŭgusto en Libano. Papo Francisko deziris, ke lia beatproklamo estu mesaĝo de espero kaj kuraĝigo por ĉiuj kristanoj, kiuj estas hodiaŭ humiligataj kaj subpremataj.***

## EPISKOPO MARTIRO JE LA HONORO DE LA ALTAROJ



Flaviano Mikaelo Melki estis mortigita pro malamo al la kredo la 29-an de Aŭgusto de antaŭ 100 jaroj en urbo Cizre, tiam parto de Granda Sirio, nun en Turkio, dum la masakroj faritaj kontraŭ la armenoj, la sirokatolikoj kaj la aliaj kristanaj komunumoj laŭ incito de movado Junaj Turkoj. Melki (aŭ Malke, laŭ alia transliterumo) naskiĝis en 1858. Ordinita episkopo de la malnova eparkio de Gazireh de la Siroj en 1913, li vivis tre malriĉe kaj li eĉ vendis siajn ornatojn por helpi la malriĉulojn. Somere de 1915 li estis for el sia diocezo kaj atingis lin sciigo pri la baldaŭaj perfortaj agoj kontraŭ liaj fideluloj. Malgraŭ, ke li povis saviĝi, li decidis reveni al sia episkopa sidejo, kie islamaj gravuloj konsilis lin eskapi, sed li decidis resti. Li estis arestita de la otomanaj aŭtoritatuloj la 28-an de Aŭgusto kune kun la loka ĥaldea episkopo, Philippe-Jacques Abraham kaj aliaj fideluloj. Laŭ la raporto de vidaj atestantoj, konigita de islamaj informofontoj, la du episkopoj estis murditaj post ilia rifuzo malkonfesi sian kredon kaj konvertiĝi al Islamo. Mikaelo Melki estis brutale turmentita kaj fine senkapigita.

La tagon post lia beatproklamo en Harissa, Papo Francisko memorigis lin okaze de la dimanĉa Anĝeluso, ligante lian ekzemplon kun la bedaŭrinda kroniko de la nuntempo: «Ankaŭ hodiaŭ – li diris – en Proksima Oriento kaj en aliaj mondopartoj la kristanoj estas persekutataj. Ke la beatproklamo de ĉi tiu episkopo-martiro verŝu en ilin konsolon, kuraĝon kaj esperon». Kaj la Papo finis per

alvoko: «[Hodiaŭ] estas pli da martiroj ol tiuj de la unuaj jarcentoj. Ke ankaŭ ĉi tio estu instigo al la leĝofarantoj kaj regantoj, por ke ĉie oni certigu la religian liberecon; kaj al la internacia komunumo mi petas fari ion, por ke oni ĉesigu perfortaĵojn kaj superaltrudojn».

## Nova Patriarko de la armena-katolika Eklezio



**Grégoire Pierre XX Ghabroyan**, naskita en Alepo (Sirio) la 15-an de Novembro 1934, estas la nova Patriarko de la armena-katolika Eklezio. Lin elektis dum sia lasta labortago la Sinodo de la episkopoj de tiu Eklezio, kunsidanta en Bzommar (Libano) de la 14-a ĝis la 24-a de Julio 2015. Papo Francisko donis tuj sian Eklezian Kunulecon al li, kiu oficiale enoficiĝis la 9-an de Aŭgusto. Pastro ekde 1959, en 1977 li estis nomumita apostola ekzarko por la katolikaj armenoj en Francio; kiam en 1986 oni levis al rango de eparĥio tiun ekzarkejon, mons-ro Ghabroyan fariĝis ĝia unua episkopo, ĝis Februaro 2013, kiam li rezignis pro aĝolimo.

La nova Patriarko estas posteulo de Nerses Bedros XIX Tarmouni, naskita en Kairo la 17-an de Januaro 1940 kaj mortinta en Bejruto la 25-an de Junio 2015, pro koratako. La lasta publika apero de ĉi-lasta estis en Romo la 12-an de Aprilo ĉi-jare, kiam li kuncelebris kun Papo Francisko la Meson en la 100-a datreveno de la armena genocido, kun la rito, por proklami doktoro de la Eklezio sanktan Gregoron de Narek *(v. EK 4-6/2015, p. 25)*.

## PAPO JOHANO PAŬLO LA 1-a BALDAŬ BEATA

La informo disvastiĝis rapide el la itala provinco Belluno (Italio), el verdega valo, meze de montaro. Albino Luciani, la Papo, kiu regis la Eklezion dum nur 33 tagoj, estos baldaŭ beatproklamita. «Kun ĝojo mi povas diri, ke eniris la finan fazon la proceso por la agnosko, fare de la Eklezio, de la sankteco de nia samurbano kaj samdiocezano, Johano Paŭlo la 1-a». Per ĉi tiuj vortoj la episkopo de Belluno, Giuseppe Andrich, donis la anoncon, okaze de Meso de li celebrita la 26-an de Aŭgusto en Canale d'Agordo, la vilaĝeto, en kiu naskiĝis Luciani.



Oni rememoras lin kiel "la Papo de la rideto", la paŝtisto kun etendita mano, la Papo proksima al la mondo de la laboro. La urbestro de Canale d'Agordo Rinaldo De Rocco memorigis dum la Meso ĉefe la mizerikordan trajton

de lia karaktero: «Li iris por viziti malsanulojn, helpi la malriĉulojn, li alportis salutojn de konsolo al la laboristoj».

Finiĝis la kolekto de fundamentaj dokumentoj kaj atestoj – fazo, kiu nomiĝas "positio" – kaj ĝi starigas fronte al la papa aŭtoritato la motivojn por agnoski la heroecon de la virtoj. Inter la prezentitaj dokumentoj estas ankaŭ verkita atesto de Benedikto la 16-a, tute escepta kaj unika faro. «Kiam la positio estis jam finita», aldonis mons-ro Andrich, «ankaŭ la emerita Papo Benedikto volis aldoni sian personan ateston. Por la unua fojo tio okazis en la historio de la Eklezio. Papo ne donas ateston pri estontaj sanktuloj».

Nun komisiono de 9 teologoj devos konfirmi la heroecajn virtojn kaj submeti la pozitivan rezulton al la Papo, kiu decidos. Por la beatproklamo necesos miraklo atribuita al la propeto de la Diservanto.

## JUĜKORTUMO HALTIGAS LA DONACON DE HOMAJ EMBRIOJ POR LA SCIENCA ESPLORO



La eŭropa Kortumo de Strasburgo por la homaj rajtoj decidis fine de Aŭgusto, ke Italio ne malrespektis la eŭropan konvencion pri homaj rajtoj ne permesante la donacon al la scienca esplorado de homaj embrioj, estigitaj per enampola fekundigo. La kazo koncernas italan civitaninon, kiu en 2002 petis kune kun sia partnero la fekundigon, el kiu rezultis 5 embrioj, kiujn oni tamen neniam enplantis pro la morto de la kunulo, murdita dum la terorisma atenco de Nassiriya, en Irako. La sinjorino rezignis je la gravediĝo, sed volis donaci la embriojn al la scienco, kaj ĉi tion la itala leĝo ne permesas. Ŝi aliris la internacian tribunalon taksante, ke oni malrespektis ŝiajn rajtojn. La Kortumo klarigis sian decidon substrekante, ke la pretigo de la itala leĝo estigis signifan debaton kaj ke la italaj aŭtoritatuloj konsideris la intereson de la ŝtato protektante la embriojn kaj la interesojn de la koncernataj unuopuloj. La Kortumo krome asertis pri la specifa kazo, ke tia malpermeso estas necesa en demokratia socio, ĉar ne estas pruvoj, ke la kunulo de la sinjorino konsentis je la donaco de la embrioj. La Kortumo do akceptis por la unua fojo la principon, laŭ kiu la decido pri la destino de embrio koncernas la privatan vivon de persono, estigante tial novajn eblecojn de apelacioj estonte. La Kortumo de Strasburgo estas ligita al la Konsilio de Eŭropo.

Laŭ profesoro Bruno Dallapiccola, genetikisto kaj scienca direktoro de la porinfana hospitalo "Infano Jesuo" de Romo, la kerna punkto de la decido estas, ke por donaci embrion necesas la konsento de ambaŭ gepatroj, en la senco, ke la embrio estas la frukto de la koncipiĝo, 50-procente de la panjo kaj 50-procente de la paĉjo; sekve, ĉar estis nur la peto de la patrino sen la konsento de la patro, ŝi ne povis decidi pri la destino de embrio. «Ni diru, aldonis prof-ro Dallapiccola, ke ĉi tiu verdikto konkludas, ke la embrio ne estas "io", sed "iu" kaj ke sekve devas esti la decido de du personoj».

Al demando: «Al kio utilas la scienca esplorado per embrioj?», prof-ro Dallapiccola respondis: «Mesaĝo, kiun oni devus sendi (…) estas, ke verŝajne oni devas rigardi al ĉi tiu esplorado kun malpli da optimismo ol tio, kion oni havas kutime. Kiu hodiaŭ faras esploron per embrioj, por ĉerpi plurpotencajn stamenajn ĉelojn, tiu devas havi je dispono grandegan nombron da embrioj, ankaŭ ĉar multaj el la frostigitaj embrioj ne donas tiujn ĉelojn, kiuj utilas al esplorado. Sekve, probable tiuj etaj donacoj havas neniun valoron, escepte de tiu, kiun ili surprenas ĉe amaskomunikiloj kaj politikaj medioj pro la celo kaj signifo, kiun oni volas doni al ĉi tiuj faroj deciditaj de gepatroj».

## LA MIRAKLA MADONO DE SINJ



Soleniĝis la 300-a datreveno de la pilgrimloko “Mirakla Madono de Sinj”, en ĉefdiocezo Split-Makaraska (Kroatio). La 15-an de Aŭgusto kardinalo Josip Bozanić, ĉefepiskopo de Zagrebo kaj speciala sendito de la Papo por la solenado, gvidis la procesion tra la stratoj de Sinj kun la statuo de la Madono kaj celebris Meson. La festo de la Ĉielenpreno de Maria estas tre sentata en Kroatio, kiel memorigis kardinalo Bozanić dum intervjuo: «Por la kroataj fideluloj – li diris – ĉi tiu festo estas “somera Kristnasko”, tiom ĝi estas sentata. La pilgrimloko de Sinj estas aparte tre grava por la fideluloj de la sudo de Kroatio, de Dalmatio kaj ankaŭ por la katolikoj de Bosnio-Hercegovino, ĉe la landlimo».

Tiu religia kaj kultura centro estas loko, kie oni konfesprenas, oni preĝas, oni praktikas devotecojn, oni petas helpon al la Dipatrino por la ĉiutaga vivo. En la mariala geografio de Kroatio Sinj estas unu el la pli gravaj pilgrimlokoj.

### La historio

En 1715 pli ol 40.000 soldatoj de la otomana armeo sieĝis Sinj por povi poste avanci al Okcidento; dum sep tagoj la defendantoj de la urbo rezistis, preĝante la Virgulinon ne lasi, ke ili kapitulacu. La 14-an de Aŭgusto jam ŝajnis, ke la urbo kaj la ĉirkaŭaĵoj estis definitive invaditaj, sed la 15-an alvenis la libereco, ĉar la invadantoj komencis retiriĝi. Onidire tio ĉi ne estis sukceso de la batalado, sed donaco de la Ĉielo dank’ al la protekto de la Dipatrino.

La preĝejo, kiu staras en la ĉefplaco de Sinj, estis konstruita de 1699 ĝis 1712, kaj rezistante kontraŭ militoj kaj tertremoj ĝi konservas sian aspekton ankoraŭ hodiaŭ. Centra, en la preĝejo kaj en la koroj, estas la pentraĵo de la Mirakla Madono: nekonata aŭtoro pentris ĝin en la 15-a aŭ en la 16-a jarcento, bildigante la Dipatrinon iom klinitan, kun la okuloj mallevitaj por prigardi sian popolon. La bildon, kiu antaŭe estis konata kiel Madono de la Gracoj, alportis al Sinj la franciskanoj de monaĥejo sankta Petro de Rama, oktobre de 1687, migrante el regiono Cetina, detruita de la milito. Post la liberigo el otomanoj la loĝantoj de Sinj kronis la pentraĵon per ora krono farita de veneciaj oraĵistoj per ormoneroj kolektitaj ĉe la loĝantaro; sur ĝi estas ĉizita latinlingva dediĉo: “Eterne triumfas kronita – jaro 1715”. Hodiaŭ la pentraĵo havas arĝentan kornicon kaj ĝin ornamas la votaj donacoj de la fideluloj.

*cs*

# IKUE KAJ KRISTANAJ ESPERANTISTOJ DUM LA 100-a UK

Kiel planite, dum la ĉi-jara Universala Kongreso de Esperanto, okazinta en Lillo (Francio) de la 23-a ĝis la 30-a de Julio, IKUE kaj la E-kristanoj montris sin kadre de pluraj programeroj.




Sabaton la 25-an ĉefcelebranto sac. Marius Dyglys el Litovio kaj kuncelebranto fr. Benoît Ente el Francio celebris Meson en la preĝejo de s-ta Maŭricio kun okdeko da partoprenantoj. Ĉe la Facebook'a paĝo de IKUE (*) oni povas spekti la filmeton de la lasta kantita himno: "Nigra Madono". La Meson oni anoncis en la Kongresa Libro kaj pere diversaj aliaj informvojoj.

Ankoraŭ sabate en la kongresejo oni aranĝis la jam nun tradician "Movada foiro"-n; dank' al la deĵoro de la IKUE-estraranoj Stefan Lepping kaj Marija Belošević la kongresanoj povis viziti la budon de IKUE kaj de la E-elsendo de Radio Vatikana. Oni ekspoziciis kelkajn eldonaĵojn en Esperanto, i.a. la Biblion kaj Adoru'n. Por la tabloj estis preparitaj specialaj plastikitaj reklamiloj, kiuj montriĝis taŭgaj kaj uzeblaj dum la semajno. Oni disdonis slipetojn kun la eldiraĵoj el la Biblio kaj el la preĝoj de Sankta Francisko kaj beata Patrino Tereza. Sur ĉiu slipeto troveblis la adresoj de la TTT-ejoj: IKUE, Espero Katolika, Arkivo de Radio Vatikana en Esperanto. Aliaj folioj proponis la "Patro nia"-n" kaj glumarkojn de IKUE. Oni montris la numeron de EK el la jaro 1905 kun la raporto pri la 1-a UK. La raportaj paĝoj ankaŭ estis plastikitaj. Kiu deziris, tiu povis ricevi presitajn revu-ekzemplerojn. La vizitantojn oni regalis per bombonoj (kunportitaj de IKUE-anoj el kelkaj landoj)

Dimanĉe la 26-an de julio estis la tago de la Ekumena Diservo, ankoraŭ en la preĝejo de la sankta Maŭricio: ĝi okazis laŭ la jam "tradicia" modelo de la Preĝosemajno por la Unueco de la Kristanoj. La diservon ĉeestis i.a. sac. Dyglys, fr. Ente kaj pastoro Gerrit Berveling, kiu predikis. Muzikis Stefan Lepping kaj geedza paro Rössler. Al la Diservo venis laŭ libera kalkulo ĉ. 300 kongresanoj, al kiuj estis disdonitaj libretoj kun la tekstoj de la Diservo en Esperanto kaj en la franca. Kvankam ĝi ne estis anoncita en la Kongresa Libro, la adreso kaj horo de la Diservo aperis en la unua kongresa kuriero kaj estis vaste diskonigita per listoj, Facebook-paĝoj, personaj kontaktoj, ksm.

Sekvis la Meso kuncelebrita de la paroĥestro de paroĥo sankta Maŭricio, sac. Xavier Behaegel kun la esperantistaj pastroj Stanisław Piotr Stolz (Pollando), Marius Dyglys (Litovio) kaj Benoît Ente (Francio).

La 28-an de Julio, mardon, IKUE partoprenis en la "faka-budo", senpage disponita oferto de UEA al la fakaj asocioj, por renkonti kongresanojn. Temis pri du intensaj horoj, ĉar mankis nek



interesuloj nek la kristana muziko en Esperanto dank' al Stefan kaj kelkaj volontuloj. La postan tagon, okaze de la dumkongresa ekskurso al Bulonjo ĉe Maro, kelkaj E-katolikoj renkontiĝis en la preĝejo de sankta Nikolao, kie en la jaro 1905 okazis la Meso, kiun i.a. ĉeestis Zamenhof. Oni kune preĝis la "Patro Nia"-n.

Kadre de la ĵaŭda kunsido de UEA pri informado (kiun partoprenas ĝiaj komitatanoj kaj aliaj interesuloj) oni interŝanĝis spertojn pri E-propagando ĉe la plurlingvaj katolikaj TTT-ejoj.



Komuna kunsido de IKUE kaj KELI

Je la ĉeesto de okdeko da kongresanoj, la tradicia komuna kunsido de IKUE kaj KELI okazis vendredon la 31-an. Komence oni priskribis la agadojn de la asocioj: la KELI-agadon prezentis Pavol Polnický kaj Marija Belošević tiun de IKUE. Sekvis prezento de la libro "Konciza Historio de Kristanismo", verkita de Gerrit Berveling, kiu mem ĉeestis kaj klarigis, de kie li havis ideon verki la libron. Alia prezento koncernis la planatan interreligian kunvenon kadre de la venontjara UK en Nitra (Slovakio). Por tiu okazo al la kunsido venis la sekretario de la LKK Jozefo Reinvart. Bruno Robineau kun la edzino tre sukcese prelegis pri pilgrimo al Kompostelo.

Fine, ĉe la ferma raportado pri la kongresa semajno estis menciita ankaŭ la agado de IKUE, kio estas sufiĉe signifa fakto ne nur, ĉar tia mencio pri IKUE okazis por la unua fojo, aŭ almenaŭ por la unua fojo post pluraj jaroj, sed ĉefe, ĉar ĝenerale oni ne mencias ĉiujn fakajn asociojn kadre de la kongresfina raportado.

Pli ĝenerale: dum la UK aperis ĉe la Kongresa Facebook fotografioj kaj mallongaj priskriboj pri la pluraj IKUE-programeroj. La fakto, ke IKUE proponis al ĉiuj kongresanoj informojn kaj ligon al Espero Katolika de la jaro 1905, kiu raportis pri la 1-a UK, havigis plurajn gratulojn. La UEA-estrarano pri fakaj asocioj kun intereso kaj eĉ simpatio interesiĝis pri la spertoj de IKUE dum la UK.

Aldone al la prizorgo de la unuopaj eventoj koncernantaj IKUE'n, ĝia vicprezidantino Marija Belošević intense aktivis ankaŭ por ĝeneralaj kontaktoj kun membroj el diversaj landoj, kun pluraj katolikaj esperantistoj ne membroj de IKUE (kelkaj promesis pripensi ĉu membriĝi). Estiĝis pluraj interparoloj pri diversaj nunaj agadoj, pri eblaj planoj, kaj kelkaj, kiuj proponis ideon, promesis anonciĝi dum la venonta aŭtuno. La pli ĝoja fakto koncernis Litovion. Kun pastro Dyglys jam antaŭ la UK kaj ankaŭ dum ĝi Marija multe parolis pri la organizado kaj pri la eblecoj reaktivigi la landan sekcion. Konklude: jam dum la UK li parolis kun litovaj esperantistaj katolikoj kaj je la fino li sciigis, ke en lia paroĥo okazos fine de septembro ilia renkontiĝo. Kunlaboros por ĝia okazigo ankaŭ Bruno Robineau, kiu volonte disponigos sian filmon pri la pilgrimo al Kompostelo.

Alia UK-kontakto estis kun hispana dominikano, fakulo pri Biblio kaj pri bibliaj lingvoj, kiu ĝis emeritiĝo instruis ĉe la Teologia fakultato en Valencio. Interalie li aŭtoris kelkajn librojn. Li mem foje gvidas E-kursojn, kaj kvankam li ne povas ekokupiĝi pri la aktivigo de IKUE-membroj en Hispanio, li tamen pretas trasndoni la informojn al siaj kursanoj kaj li pretas kunlabori por la estonta reeldono de la Meslibro.

Resume, oni povas diri, ke la ĉi-jara UK estis vere fruktodona por IKUE, kaj tio ŝuldiĝis ĉefe al la uzo de modernaj komunikiloj, por sukcesa diskonigo de la informoj.

*Informis kaj fotis Marija Belošević*

(*) La pli facila maniero por trovi la Facebook'an paĝon de IKUE estas alklaki la koncernan simbolon, alte dekstre en www.ikue.org.

# LA EKUMENA E-KONGRESO EN STRASBURGO

La komuna kongreso de KELI kaj IKUE okazis en Strasburgo ekde la 1-a ĝis la 8-a de Aŭgusto 2015. Inter la 58 partoprenantoj el 17 landoj (Aŭstrio, Ĉeĥa Respubliko, Ĉinio, Estonio, Francio, Germanio, Britio, Hungario, Italio, Koreio, Kroatio, Nederlando, Pollando, Rumanio, Slovakio, Svedio kaj Svisio) estis ankaŭ du infanoj, hungaraj knaboj.

Strasburgo (franclingve Strasbourg, alzaclingve Strossburi kaj germanlingve Strassburg) estas la ĉefurbo de la departamento Malalta Rejno en la regiono Alzaco, plej oriente de Francio. En Strasburgo loĝas ĉirkaŭ 272000 loĝantoj. Krom francoj tie loĝas ankaŭ germanoj, araboj, judoj, azianoj kaj afrikanoj. Strasburgo estas urbo malfermita kaj kosmopolita, kie katolikoj kaj protestantoj vivas harmonie. En parto de la insulo de rivero Ill situas impona gotikstila Katedralo Notre Dame – Nia Sinjorino, kiu estis konstruata dum la jaroj 1176-1439 kun ĝia pinaklo alta 142 m. Ĉi-jare la katedralo festas 1000 jarojn ekde la fondiĝo. Ĝi estas ornamita per amaso da statuoj, astronomia horloĝo kaj belaj vitraloj. La krono de 12 steloj sur la kapo de Virgulino Maria en la vitralo super la ĉefa altaro estis inspiro por Robert Schumann por la flago de Eŭropa Unio.

La temo de la kongreso estis "Donu al mi trinki" (Joh 4,7), "La malsameco pliriĉigas min". Temas pri la renkontiĝo de Jesuo kun samarianino ĉe la puto.

Ĉiutage okazis sanktaj mesoj en proksima kapelo kaj komunaj matenaj kaj vesperaj preĝoj kaj kantoj en la kongresejo.

Okazis prelegoj ne nur pri la kongresa temo. Ekzemple ĉina kristano Zhang Fude rakontis pri la vivo de kristanoj en Ĉinio. Lia avino estis malliberigita en ĉina koncentrejo milojn da kilometroj de sia hejmo dum 20 jaroj nur pro tio, ke ŝi estis kristanino. Sed dank' al sia forta kredo ŝi transvivis eĉ tiel longan malliberon kaj revenis hejmen. Teologoj Gerrit Berveling, Gerard Siegwalt kaj Emmanuel Wald prelegis pri diversaj tradukoj de la Sankta Biblio.

Ni vizitis diversajn preĝejojn en la urbo (romkatolikan, evangelianan, metodistan, ortodoksan, judan). En la metodista preĝejo ni trarigardis biblian ekspozicion. Tie estis ne nur faksimilo de paĝo de la plej malnova franca Biblio el la 14-a jarcento, sed ankaŭ granda kolekto de Biblioj en diversaj lingvoj. Ni trovis la Bibliojn en hungara kaj ĉeĥaj lingvoj, la Biblion presitan en Brajlo; kompreneble ne mankis la Sankta Biblio en Esperanto.

En la tuttaga ekskurso ni vizitis alzacan regionon, urbeton Obernai, kiu kun siaj lignokradaj, belegaj dometoj aspektas kiel fabela urbo. Ni admiris tie la romkatolikan gotikan preĝejon, la Sinagogon kaj la muregojn de la iama fortikaĵo.

Poste sur Monto Sankta Odilia ni vizitis la monaĥejon, rigardis la preĝejon kaj kapelojn konstruitajn en bela natura ĉirkaŭaĵo. De sur la montopinto ni povis vidi la landon eĉ ĝis la germana Nigra Arbaro (Schwarzwald). Sankta Odilia de Alzaco (662-720) estas patronino de bona vido kaj Alzaco.

En vilaĝo Gertwiller ni vizitis la fabrikon kaj



muzeon de mielkuko.

La vizito en la Eŭropa Parlamento, grandioza konstruaĵo, kie laboras niaj deputitoj, estis tre interesa. Se reprezentantoj de 28 membro-ŝtatoj de Eŭropa Unio parolas 24 lingvojn, ili bezonas 1800 tradukistojn. Kelkaj el ni fajre diskutis kun franca ĉiĉeronino pri la ebla rolo de Esperanto en la Eŭropa Parlamento. La ĉiĉeronino klarigis, ke la deputitoj jam estas tiel alkutimitaj paroli la anglan, francan kaj germanan, ke oni ne bezonas solvi lingvajn problemojn. La Parlamento provizore funkcias sen Esperanto.

Poste ni vizitis la duan plej grandan sinagogon en Eŭropo, kiu nomiĝas Sinagogo de la Paco.

Korea esperantistino Min Hyeongkyeong invitis nin al la 102-a Universala Kongreso de Esperanto, kiu okazos en Seulo en 2017.

La venontjara kongreso de KELI okazos en Bratislava, la ĉefurbo de Slovakio kaj IKUE-kongreso okazos en Nitra tuj antaŭ la UK.

*Informis Pavol Petrík*
*Fotis Marija Belošević*

## «ROM-KATOLIKA AKVO»

### Prelego de Giovanni Daminelli dum la 21-a EEK. Strasburgo 02/08/2015

Laŭ la temo de nia kongreso – "Donu al mi trinki" – mi volas proponi la akvon, kiun mi ricevis el la Katolika Eklezio (aŭ la Rom-katolika Eklezio, ĉar laŭ la Apostola Kred-konfeso, ni ĉiuj kredas je la katolika Eklezio – sed kutime oni nomas katolikoj la kristanojn, kiuj rekonas en la episkopo de Romo sian ĉefan reprezentanton). Mi ne estas teologo, kaj mi ne volas enmiksiĝi en aferoj pli grandaj ol mi. Mi volas nur atesti, kial mi estas katoliko, kiajn valorojn mi trovis kaj trovas en mia fido, kaj meti je dispono de ĉiuj iom de la akvo, kiun mi ĉerpis el la Katolika Eklezio.

Do, kial mi estas katoliko?

Unue, mi estas katoliko ĉar mi naskiĝis en katolika familio. Sed ne sufiĉas esti denaska katoliko, por resti katoliko aŭ kristano dum la tuta vivo. Venas momento en la vivo, dum la adolesko, en kiu oni ne akceptas la veron apriore, oni volas racie pravigi sian kredon. Temas pri la adoleska krizo, en kiu oni dubas eĉ pri la ekzisto de Dio. Mi pensas, ke preskaŭ ni ĉiuj pasigis tian periodon, post kiam la propra fido aŭ malaperas, aŭ estas anstataŭata de aliaj fidoj, aŭ restas nur kiel folklora kutimo, aŭ ĝi iĝas adolta: fido vivata, fido daŭre serĉata.

Mi ne kredas je la raciaj pruvoj pri la ekzisto de Dio proponataj de la filozofoj: ili estas tro raciaj, tro artefaritaj, tro malvarmaj por esti akceptataj, ne nur per la menso, sed ankaŭ per la koro. La fido estas donaco de Dio al la homo, kiu kapablas rekoni Lin en la vivo, en la kreitaĵoj, en la ĉiutagaj okazintaĵoj.

Kial do fine mi decidis akcepti la fidon proponitan al mi de miaj gepatroj? Unue pro la figuro de Kristo. Li estas malregula homo (la junuloj ŝatas kontesti la regulojn). Oni atendis Mesion, kiu liberigas sian popolon subpremátan de la romianoj kaj Li lasas sin krucumi. Oni atendis homon kapablan allogi trupojn de mili-



*Prelegas D-ro Giovanni Daminelli*

tistoj (kiel la Makabeoj), kaj Li sin ĉirkaŭas per simplaj fiŝkaptistoj. Oni atendis potenculon el la familio de Davido, kaj prezentiĝas simpla metiisto. Oni atendis saĝulon pretan instrui eĉ al la doktoroj de la leĝo, kaj prezentiĝas, unue, knabeto, kiu ja instruas al la doktoroj en la Templo, sed poste homo, kiu instruas en la placoj al simpla popolo kaj dankas la Patron pro tio, ke Li malkaŝas al la infanoj, kion Li kaŝis al la saĝuloj kaj prudentuloj. Oni atendis homon, kiu venas de Dio: – respektema de la leĝo – sed, kontraŭ la leĝo, Li sanigas la homojn sabate *(ĉi tiu homo ne estas de Dio, ĉar li ne observas la sabaton)*.

Sed en la parolado de la monto (aŭ de la

ebeno, laŭ Luko), Li montras sin vera kontestanto: *feliĉaj la malriĉuloj, la malsatantoj, la plorantoj, la malamataj, la humiluloj, la kompatemaj, la pacigantoj, la kore puraj... Amu viajn malamikojn, benu tiujn, kiuj vin malbenas...*



Per ĉi tiuj vortoj Li tute renversas la komunan pensmanieron, niajn homajn valorojn. Li estas ne nur homo, sed ankaŭ Dio, kaj laŭ la vortoj de Paŭlo: *La malsaĝeco de Dio estas pli saĝa ol la saĝeco de la homoj; kaj la malforteco de Dio estas pli forta ol la forteco de la homoj.*

Ĉi tio konvinkis min.

Kiam mi vidas la malamon, la malamikemon, eĉ la insultojn fare de homoj kaj organizoj kontraŭ la moralaj indikoj de nia Eklezio, mi pensas al Liaj vortoj: *Feliĉaj vi estas, kiam oni vin malamos kaj vin izolos kaj vin riproĉos,* aŭ: *Ve al vi, kiam ĉiuj homoj parolos bone pri vi! Ĉar tiel same faris iliaj patroj al la falsaj profetoj.* Kaj pro tio, mi sentas min sur la ĝusta vojo.

Alia kialo de mia konsento kun la katolika Eklezio estas la kulto de la sanktuloj, kaj precipe de Maria, la Patrino de Jesuo. Mi scias, ke sole Dio sufiĉas. Sed ni ne estas puraj spiritoj, ni estas homoj kun nia psiko, ni bezonas la konfronton kun aliaj homoj, kun tiuj, kiuj pleje spertis sian amikecon kun Dio. (Pro tio niaj rilatoj kun Dio estas pli kun Jesuo ol kun la Triunuo, ĉar Li estas ankaŭ homo: Li estas unu el ni). En ĉi tiu senco, ni sentas apartan devotecon al la Dipatrino Maria (pri ĉi tio ni havas komunajn sentojn kun la ortodoksuloj). La kulto al la Virgulino Maria, faras nian konfesion tre apuda al la homa sento, al la homa psiko, kiuj bezonas inan figuron. Papo Johano Paŭlo la unua diris, ke Dio Patro estas ankaŭ Patrino. Sendube. Sed tio estas teoria aserto, nia psiko bezonas homan virinon, ni devas senti, ke ŝi komprenas nin per patrinaj sentoj.

Ŝi akceptis iĝi patrino de Jesuo, ŝi vivis kun Li, kaj Li montris sian obeemon al ŝi ekzemple en la epizodo de la nupto en Kana. Ŝi travivis la tutan vivon de Jesuo, de la koncipiĝo ĝis la morto, kiam sub la kruco, ŝi estis konfidita kiel patrino al Johano, kaj tiamaniere ŝi iĝis la ĉiela patrino de ni ĉiuj. Pro tio, jam de la unuaj jarcentoj, disvastiĝis la kulto al la Virgulino; ĉie oni konstruis preĝejojn kaj sanktejojn al ŝi dediĉitajn. Certe la bona kristano, scias, ke ŝi ne estas Dio; la kulto al ŝi ne estas adorado, sed nur aparta respektego.

Kelkfoje mia paroĥestro plendas, ĉar li vidas fidelulojn, kiuj, enirante en la preĝejon, anstataŭ iri antaŭ la tabernaklo, en kiu estas la Korpo de Kristo, t.e. Dio, iras rekte al la statuo de la Madono. Tio liturgie ne estas la ĝusta sinteno. Sed mi pensas, ke la Sinjoro, kiu amas la simplulojn, ne ofendiĝas. Ĉe ni estas devizo, kiu diras *"ad Jesum per Maria"* (al Jesuo pere de Maria). La interveno de Maria, kiu peras la gracojn de Dio estas en la sperto de multaj kristanoj.

La samon ni povas diri pri la sanktuloj. Ili estas amikoj de Dio. Psikologie ŝajnas pli facile atingi la bonvolemon de la Sinjoro pere de ili. En la Apostola Kredo ni konfesas kredi je la komuno de la Sanktuloj.

Alia karakterizo de la Katolika Eklezio estas ĝia hierarkio. Temas pri la apostola sinsekvo. Kristo ordonis al la apostoloj iri en la tutan mondon por porti la Evangelion. La Apostoloj ne povis vivi eterne en ĉi tiu mondo, pro tio ili transdonis la taskon al siaj posteuloj – la episkopoj – kiuj envice kreis aliajn episkopojn, ĝis nun. La tuta episkoparo havas la taskon gardi, aktualigi kaj anonci la mesaĝon de Kristo. Post sia resurekto Kristo trifoje petas de Petro, ke li konfesu sian amon al Li, kaj trifoje Li ordonas al Petro: *Paŝtu miajn ŝafidojn.* Pro tio Petro estis konsiderata la unua inter la apostoloj, kaj pro la fakto, ke Petro estis la episkopo de Romo, la episkopo de Romo, la papo, ĝis hodiaŭ, estas konsiderata de ni la unua el la episkopoj, la estro de la Katolika Eklezio. Pro tio ni opinias, ke la Sankta Spirito asistas aparte lin kaj la tutan episkoparon: la tiel nomatan "Instruanta Eklezio".

Kompreneble la Sankta Spirito elspiras kien Li volas kaj donas libere siajn donacojn al iu ajn, ankaŭ al la ne-katolikoj – kiel diras papo Francisko. Pro tio, oni devas agi laŭ sia rekta konscienco, t.e. laŭ la inspiro de la Spirito, kvankam kelkfoje, tio ne estas laŭ la indikoj de la hierarkio. En la historio de la Eklezio estas pluraj ekzemploj de sanktuloj, kiuj dum sia vivo estis kondamnitaj de la hierarkio, kaj poste oni devis rekoni, ke ili pravis kaj agis laŭ la inspiro de la Sankta Spirito. Tia estas la destino de la Profetoj.



*Dimanĉa mescelebranto estis sac. Benoît Ente*

Kial do la hierarkio? Ĉar ne ĉiuj el ni estas profetoj aŭ sentas sin profetoj. La hierarkio, aparte inspirita de la Sankta Spirito, estas helpo al la malforteco de nia psiko. Ĝi donas al ni sekurecon kaj trankvilon. Kiomfoje ni dubas en la ĉiutaga vivo: ĉu ĉi tiu elekto estas vere laŭ la Spirito, aŭ laŭ niaj emoj, laŭ rekta konscienco aŭ laŭ nekonscia impulso? Sekvi la indikojn de la Eklezio kun prudenta humilo donas al ni, simplaj homoj, la percepton agi laŭ la dia volo.

Nuntempe nia Eklezio estas atakata de pluraj flankoj precipe rilate al siaj etikaj temoj. Mi volas mallonge pritrakti unu temon: tiu de la geedziĝo. En Oktobro 2014 okazis en Romo eksterordinara Sinodo de la episkopoj por prepari la Ordinaran Sinodon pri la Familio, kiu okazos en Oktobro 2015. Pro tio, la itala Sekcio de IKUE pritraktis tiun ĉi temon dum sia lasta kongreso. Por montri la penson de la Eklezio pri tio, mi prelegis pri temo titolita: "De la komenco ne estis tiel". La titolo inspiriĝas al la konata epizodo rakontita de la evangeliistoj Mateo kaj Marko, en kiu la fariseoj pridemandas Jesuon ĉu estas permesate forsendi sian edzinon, ĉar Moseo permesis tion, kaj Jesuo respondas, ke "de la komenco ne estis tiel". Liaj vortoj rilatas al la libro de la Genezo, en kiu estas du rakontoj pri la kreo de la homo. En tiu de la unua ĉapitro Dio kreis samtempe la viron kaj la virinon: *Dio diris: «Ni kreu homon laŭ Nia bildo, similan al Ni; kaj ili regu super la fiŝoj de la maro, kaj super la birdoj de la ĉielo, kaj super la brutoj, kaj super ĉiuj rampaĵoj, kiuj rampas sur la tero».* ***Kaj Dio kreis la homon laŭ Sia bildo; laŭ la bildo de Dio Li kreis lin; en formo de viro kaj virino Li kreis ilin.*** *Kaj Dio benis ilin, kaj Dio diris al ili: «Fruktu kaj multiĝu, kaj plenigu la teron; kaj submetu ĝin al vi, kaj regu super la fiŝoj de la maro kaj super la birdoj de la ĉielo, kaj super ĉiuj bestoj, kiuj moviĝas sur la tero».*

Do la homo eliris el la manoj de Dio, respegulante en sia aspekto la trajtojn de sia Kreinto: surtere, la bildo de Dio plej apuda al la perfekteco estas la homo. Viro kaj virino, edzo kaj edzino. Dio estas amo. En la geedza amo ni povas legi la amon de Dio. Edzo, edzino kaj ilia amo estas bildo de la Triunuo: Patro, Filo kaj Spirito.

En la rakonto de la dua ĉapitro, unue estas kreita la viro kaj poste la virino: *Kaj Dio la Sinjoro konstruis el la ripo, kiun Li prenis de la homo, virinon, kaj Li venigis ŝin al la homo. Kaj la homo diris: «Jen nun ŝi estas osto el miaj ostoj kaj karno el mia karno; ŝi estu nomata Virino, ĉar el Viro ŝi estas prenita». Tial viro forlasos sian patron / kaj sian patrinon, kaj aliĝos al sia edzino, kaj* ***ili estos unu karno***.


Oni parolas pri la *ekstazo de Adamo*, antaŭ la miro, kiu lin ekfrapis, kiam li vidis apud si, antaŭ si, estaĵon al si simila, «osto el liaj ostoj kaj karno el lia karno». Viro kaj virino estas du estaĵoj, sed ili estas kreitaj por esti kiel unu karno. Diference ol la gepatroj, kiuj ne elektas siajn filojn, kaj ol la filoj, kiuj ne elektas siajn gepatrojn – la geedzoj elektas unu la alian, serĉas unu la alian, ili allogas unu la alian, ili – antaŭ ĉio – preparas sin por travivi *porĉiame* sian reciprokan sinoferon. La homa seksemo estas bildo kaj similo de Dio, ĉar ĝi estas en si mem fekundeco kaj unueco, tiel kiel Dio-amo estas kaj fekundeco kaj unueco. Pro ĉi tiuj konsideroj, nia eklezio postulas nedisigeblan geedziĝon kaj nur inter viro kaj virino.

*(Fotis Marija Belošević)*

# KUNVENOJ

## La jara kunveno de la Ĉeĥa IKUE-Sekcio

okazis de la 11-a ĝis la 13-a de Septembro kaj ĝin partoprenis trideko da gefratoj. Al la renkontiĝo aliĝis ankaŭ IKUE-anoj el Germanio, Kroatio kaj Slovakio. La gastiganta urbo estis la sudbohemia urbo Třeboň (Trzebon) kun riĉa historio kunigita kun gentoj de Rožmberk (Roĵmberk) kaj Schwarzenberg (Ŝvarcenberg); ĝi situas en ĉarma pejzaĝo kun multaj fiŝlagetoj kaj ankaŭ estas konata pro sia torfa banloko. En multaj direktoj ĝi estas specifa precipe pro pitoreskaj monumentaĵoj kaj urbaniza valoro, ĉar ĝi estas ununura urbo en Bohemio, kies urbocentro estas ĝis nun ĉirkaŭita per ĉiuj originaj urbaj pordegoj. Tial ĝi estis deklarita kiel urba rezervejo de monumentoj kaj la ĉirkaŭa naturo protektita naturregiono kaj biosfera rezervejo de UNESCO. Krom tio estas tie vasta kastela konstrukomplekso kun la apuda parko, pitoreska urboplaco, la jam menciitaj urbaj pordegoj kaj multaj pluaj monumentaĵoj kaj belaj lokoj. Kaj tio sur malgranda areo, por kies vizito oni ne bezonas multan tempon. La renkontiĝo okazis en antikva eks-monaĥeja konstrukomplekso en la centro de Třeboň, kiu kun la preĝejo de la V. Maria Reĝino kaj sankta Jiljí (Egidio) estas la plej frapa dominanto de la negranda origina urba centro.




*Mescelebras sac. Xaver Josef Kobza*



*Prelegas Inĝ. Jan Kalný*

La unuan tagon oni aliĝis al la lokaj parokanoj por la sankta Meso. La vespera inaŭgura programo entenis la prezentojn pri la diversaj intaj aranĝoj: IKUE kongresoj en Parizo kaj Pécs, kaj la Bibliaj tagoj en Tuchoměřice. Dum la sabata mateno estis ebleco pli profunde ekkoni la preĝejon kaj la eksan monaĥejan komplekson, kaj poste la urbo-centron. Sekvis la konferenco de la Ĉeĥa IKUE sekcio. Krom la raporto pri la agado, oni elektis la sekcian prezidanton: posteulo de D-ro Max Kašparů, iĝis Miloslav Švaček. La prelegon pri la heroo de amo Přemysl Pitter prezentis D-ro Petr Chrdle. Sekvis la esperantlingva sankta meso, kiun celebris la 94-jara ĉeĥa sacerdoto Xaver Kobza. Pri la ĉi-jaraj aranĝoj – Universala Kongreso en Lillo kaj la Ekumena E-Kongreso en Strasburgo – parolis Marija Belošević. Ŝi ankaŭ prezentis la libron kun la prelegoj okazintaj dum la kongreso en Pécs, kaj ŝi mallonge informis la ĉeestantojn pri la agado de IKUE.




*Pri Přemysl Pitter prelegas D-ro Petr Chrdle*

La lastan prelegon pri la "Dia Mizerikordo" prezentis dimanĉon matene Inĝ. Jan Kalný. Ankaŭ ĉe la adiaŭo, la partoprenantoj ĉeestis la meson kun paroĥanoj. La kunvenon muzike pririĉigis operkantisto Miroslav Smyčka.

*(informis Marija Belošević)*

**La 39-aj Esperantistaj Preĝtagoj en Ĉenstoĥovo** okazos de la 9-a ĝis la 11-a de Oktobro 2015, kiel kutime en la Domo de la Kongregacio de la Mizerikordaj Fratulinoj, en strato sankta Barbara 43. Gvidos la Preĝtagojn pastro Roman Gmyrek, landa animzorganto de esperantistoj. *(el Frateco)*

**Monda Junulara Tago, Krakovo, de la 26-a ĝis la 31-a de Julio 2016.** Estas deziro de IKUE, ke en la MJT partoprenu ankaŭ junaj IKUE-anoj (membroj malpli ol 25-jaraĝaj). Pro tio jam pasintjare IKUE komencis agadon por la refondo kaj reaktivigo de sia junulara sekcio. Ĉi-aŭtune oni komencos ankaŭ monkolekton por helpi junajn IKUE-anojn ĉeesti en Krakovo. Jam sciiĝis, ke kelkaj junaj katolikoj-Esperantistoj partoprenos la MJT'n kun siaj paroĥaj grupoj. Estus bone ricevi informojn pri ili, por provi organizi almenaŭ unu komunan aranĝon. Bonvolu anonciĝi skribante al: <ikue.reto@gmail.com>.

## INTERRETO



La fejsbuka paĝo honore al beatulino **Chiara Luce Badano** (movado de "Fokolaroj") gastigas ĉiutage mallongan penson en pluraj lingvoj. Ankaŭ Esperanto ĉeestas: https://www.facebook.com/chiaralucebadano. Ĉiutage Antonio De Salvo tradukas, kaj Marija Belošević plusendas. La sama teksto aperas ankaŭ en la fejsbuka paĝo de IKUE, prizorgata de Marija: https://www.facebook.com/permalink.php?story_fbid=702635449870779&id=263471327120529 *(informis: Antonio De Salvo).*



La 27-an de Julio estas la liturgia festo de beata **Titus Brandsma**, karmelano, universitata profesoro, spirita rezistanto al naziismo. Ĝis nun li estas la sola aktiva esperantisto, kiun la katolika Eklezio «portis sur la altarojn». Lian "preĝon antaŭ la bildo de Jesuo" estis esperantigita (http://breviero.org/titus-brandsma/pregho-eo.pdf). Ankaŭ ekzistas la tekstoj de la Meso honore al li: (http://breviero.org/titus-brandsma/meso-tekstoj.pdf), tamen, por celebri ĝin ekster iu Karmela monaĥejo oni devas peti specialan permeson de episkopo, ĉar li estas beatulo, ne kanonizita. *(informis Familio Masala: Anne kaj Bruno kaj la geinfanoj Elizabeth, Francjo, Gaetano, Helena kaj Jozefo).*



La 11-an de Julio 2015 forpasis 87-jaraĝa la emerita ĉefepiskopo de Bolonjo (Italio), **Giacomo Biffi**. Li elmontris interesiĝon pri la E-movado (v. EK 1986-3,4 kaj 1986-10). En Interreto eblas legi unu lian verkon (Contro Mastro Ciliegia) tradukitan al Esperanto fare de Armando Zecchin: http://www.ueci.it/eldonoj/verkoj/k_majstro_cxerizo.htm. *(informis: Antonio De Salvo).*



**ĜOJIGA SCIIGO** venis de frato diakono D-ro Max Kašparů, eksprezidanto de la Ĉeĥa IKUE-Sekcio kaj ĝia nuntempa komitatano: la 31-an de Oktobro 2015 li akceptos en preĝejo de urbo Žirovnice, Ĉeĥio, el la manoj de episkopo D-ro Ladislav Hučko, CSc, la pastran konsekron por la bizanca rito. Ekzistas espero, ke li ricevos esceptan permeson mescelebri en Esperanto ankaŭ en latina rito. *(informis la Ĉeĥa IKUE-sekcio).*

**69-a KONGRESO DE IKUE: LA UNUA OFICIALA INFORMO** - La 69-a Kongreso de IKUE okazos en Nitra, urbo, kiu venontjare gastigos la Universalan Kongreson de Esperanto. Nia Kongreso okazos unu semajnon antaŭ la UK, t.e. **de la 16-a ĝis la 23-a de Julio 2016** en la Teologia kaj Pastra Seminario. Gravas mencii, ke ĉi tiu kongreso estos la 1-a Kongreso de IKUE en Slovakio. La temo de la Kongreso estos "La vizaĝo de la mizerikordo". La aliĝilo kun ĉiuj detaloj aperos je la fino de Oktobro. Tiuj, kiuj deziras havi rekte la informojn retpoŝte, bv. aboni la "kongresan cirkuleron", sendante simplan retmesaĝon al la adreso: ikuekongreso@gmail.com

# *Nī funebras kaj kondolencas*

## HANSJÖRG KINDLER



«Trixini forlasis la surteran scenejon». Per ĉi-tiu titolo unu el la multaj germanaj gazetoj, kiu donis la funebran informon, omaĝis al Hansjörg Kindler. Trixini estis la artistnomo de nia frato, naskita la 3-an de Septembro 1933 en Villingen-Schwenningen kaj mortinta la 22-an de Aŭgusto 2015 en Kempten (Germanio). Li estis konata germana magiisto, pupludisto, iama pastro kaj esperantisto. En lia naskiĝurbo la maljunuloj ankoraŭ rememoras kiel la juna Hansjörg el la fenestro de la modbutiko de liaj gepatroj ŝatis amuzi la preterpasantojn per siaj marionetoj. Li vizitis kursojn pri pupludado ĉe la fama teatro de marionetoj Hohnsteiner en Hamburgo. Membro de la internacia magia societo, ĉi-tiu amataĵo estis lia profesio antaŭ la studado de teologio kaj pastriĝo: dum 17 jaroj li estis paŝtisto unue en la montara Weinheim, poste en Schopfheim kaj Säckingen kaj ekde 1973 pastro de la germanlingva komunumo en la "eŭropa paroĥo" ĉe la sidejo de la Eŭropa Komunumo kaj profesoro de religio en la eŭropa lernejo en Luksemburgo, kie li ankaŭ estis vicprezidanto de la Luksemburgia Esperanto-Asocio. En 1975 li komencis aktivi en la E-movado; por IKUE li estis organizanto de la IKUE-Kongreso en 1979 en Luksemburgo. Fine de tiu jaro li forlasis pastrecon, transiris al la Prakatolika Eklezio kaj edziĝis. Li daŭrigis pli intense sian laboron de pupludisto kaj magiisto, starigante propran teatron en Paderborno, kie li ankaŭ instruis sian arton. Por sia artista agado li turneis en pli ol 50 landoj, en kiuj li ĉiam povis uzi E-on. 13 jarojn poste li translokiĝis al Rieden am Forggensee (Allgäu), ankoraŭ konata kiel la "magiisto kun la blua ŝtono". Li ofte magiis en E-aranĝoj, i.a. en pluraj Universalaj Kongresoj, kaj multe instruis Esperanton. Aŭtoro de pluraj artikoloj, poemoj kaj libroj, i.a. pri siaj spertoj kiel artisto. Du el siaj amuzaj anekdotoj li rakontis okaze de intervjuo ĉe la E-redakcio de RV (j. 2003): «En la ĝangalo de Sumatro mi trovis bankistojn kaj iu germana amiko, bankisto, diris: 'Ha, estas la magiisto Trixini, li ankaŭ parolas Esperanton; eble vi ne scias, kio estas tio' kaj la indoneziano diris: 'Lernu la internacian lingvon!', kun akuzativo, jes. Kaj en Katmanduo, en hotelo, mi volis aĉeti iun figuron kaj la vendisto demandis: 'De kie vi venas?' en la angla kaj mi demandis: 'Ĉu vi hazarde parolas Esperanton?' kaj li rigardis min kaj diris: 'Malbona knabo!'». Li mortis sojle de sia 82-a naskiĝdatreveno en ripozdomo, post lukto kontraŭ kancero.

## PASTRO PASQUALE CAMPOBASSO

Per reveninta koverto kun EK oni eksciis, ke februare de 2014 mortis, 85-jaraĝa, la DM de IKUE, Pastro Campabasso. Li estis ordinita pastro la 28-an de Junio 1953 dum la sama celebro por la pastrigo de pastro Magnani. Dum 30 jaroj ĝis 1999 li estis paroĥestro en Spadarolo-Rimini (Italio). Liaj eksaj paroĥanoj tiel memorigis lin: «Li estis tre ligita al sia teritorio; li havis pli ol unu doktoriĝon; li estis kavaliro de la laboro, instruis Esperanton. Li postlasis al ni tre valoran bibliotekon. Li multe emfazis la kulturan pliriĉiĝon de la komunumo. Li povis aspekti malmola, sed li estis sufiĉe noviga: li starigis grupojn por la gejunuloj, la samaj, kiuj, hodiaŭ patroj kaj patrinoj, estas la spino de la paroĥo». Ĉe la esperantistoj oni rememoras lin, kiel simplan sed helpeman homon. Verŝajne en nia movado pli "famis" la du aliaj pastroj el Rimini, Ciccanti kaj Magnani; P. Campobasso agadis silente, sed ne malpli merite.